TEA-BULTENO

24ª JARO - N° 160 **SEPTEMBRO - OKTOBRO** **N. 9-10/2021**

Maloftaj estas la personoj kiuj uzas la menson, malmultaj kiuj uzas la koron, unikaj kiuj uzas ambaŭ.
Rita Levi Montacini, Nobel-premiito pri Medicino (1909-2012)

Kara Legantaro!

Ĉi foje, enkonduke, mi ne parolos pri kronviruso, nek pri problemoj ekonomiaj, sociaj ks, nek pri la malbona stato de nia movado, loke kaj internacie, male vi havos la ŝancon legi tre belan fabelon, kiu ne naskas el fekunda menso de fabelisto, sed el malnova rubriko de triesta ĉiutaga ĵurnalo, aperinta preskaŭ antaŭ unu jarcento, pli aŭ malpli. En foraj tempoj, eĉ ĉi kortuŝajn okazaĵojn ĵurnalistoj rakontis al sia legantaro!

Estis iam... malriĉa *caligher*[1.] kiu loĝis en la malnova urboparto. Li posedis etan, sed vere etan, subŝtuparan ejon, kie ĉiutage laboris kiel ŝuisto. Laciga kaj pena estis la laboro kaj mono neniam sufiĉis por satigi lian multkapan familion. Senkuraĝigita pro tiu situacio senelirvoja, li ekprenis tre malfacilan decidon, nome forlasi la lastan etuleton, antaŭ kelkaj tagoj naskiĝintan konsolita de la penso, ke eble ĝia destino estos malpli maldolĉa, ol tiu de ĝiaj gefratoj. Kun egaj bedaŭro kaj rezignacio, la mizera ŝuisto portis la fileton al la turniĝanta rado por forlasotaj infanoj.

Dum li estis eksurmetonta ĝin sur la ŝtonplaton, li ekaŭdis ies ploreton: li rondirigis la radon kaj trovis alian ĵusnaskiton, kiun certe oni estis forlasinta antaŭ nur kelke da momentoj. Tre ŝokita, li ne havis la forton kontraŭstari siajn pensojn kaj reportis hejmen ne nur sian propran fileton sed eĉ tiun trovitan. Lia edzino estis feliĉega pro la hejmenreveno de sia etulo, sed konsterniĝis pro la novalveninto. Ŝi nur pridemandis la edzon: "Kiel ni faros? Kiel ni faros?" La viro restis senvorta, silentis kaj subite pro la emocioj ĵus travivitaj kaj tiu amara sento de senpoveco li eksplodis per senespera plorado. Tiam la edzino estis delikate kuŝanta la novulon en la korbon por ŝanĝi la vindaĵojn: dum la senvindigado, la edzino ekkriis pro ĝojo: amasigitaj en vindostrioj, estis multaj, multaj, multegaj oraj moneroj!!!

Ekde tiu tago, la ŝuista domo iĝis riĉa, la prizorgadoj ĉesis kaj ĉiuj gefiloj, inkluzive de la nova infano, kreskadis feliĉaj kune kun siaj gepatroj.

Ankoraŭfoje la Providenco helpis la grandanimajn personojn.

Kortuŝa, ĉu ne? Post legado de tiu artikoleto, mi ekpensis pri tiuj virinoj, kiuj pro plej diversaj kaŭzoj forlasis (aŭ devis forlasi!) siajn infanojn al kompatemo de bonkoruloj, esperante je bona estonteco por siaj forlasitoj. Ankaŭ en Triesto troviĝis la Rado de forlasitaj infanoj, *nun masonfermita: ĝi situas dekstraflanke de la urba Ĉefmalsanulejo.*

Kelkaj vortoj pri tiaj radoj, ĝenerale kaj koncize, aŭ pli precize pri la starto de tiu "kutimo". La unua ekfunkcias en 1188, en Francujo; ĝin sekvas Italujo, 1198, pro la interveno, laŭ la historio, de Papo Inocento la 3ª, hantita de ripetiĝantaj koŝmaroj, dum kiuj li vidadis infanajn kadavrojn elakvigitajn de fiŝistoj per la retoj. Tiel li volis doni ian 'helpilon' por malpliigi la infanajn murdojn.

Nu, kiel estis farita tiu rado? Ĝi konsistis en ruliĝanta cilindro kun la malferma flanko enigita en la muron. Tio permesis lasi la novnaskiton en kompleta anonimeco. La rado, ekfunkciigita de la pezo de la bebo, sonorigis interne, de gardistino ĝi estis elprenita kaj, poste, vartita kaj edukita koste de la komunumo. En Triesto, super la rado ankoraŭ hodiaŭ legeblas sur plato: "Kial mia patro kaj mia patrino forlasis min? Sed la Sinjoro zorgos pri mi!". Sub tio videblas la spaco iam okupita de la rado, fermita en 1875 pro ekonomiaj kialoj (de la komunumo).



Sed kia estas hodiaŭ la situacio en Italio? Kiel sciate, malgraŭ la leĝaj garantioj, okazas ankoraŭ multnombraj kazoj de forlasiteco, pro pluraj malsamaj motivoj. Tial, ekzemple, en Romo ĉe la malsanulejo Polikliniko Casilino *ekfunkcias de 2006 protekta strukturo, nomita: "Ne ĝin forlasu, konfidu ĝin al ni". Tie oni asistas kaj helpas la forlasitojn, garantiante al la patrinoj sekretecon kaj anonimecon.*
Jes, tiel ĉi!

La redaktanto!

1. En la triesta dialekto *caligher* (elp. kaligèr), Esperante ŝuisto.

Finfine bona novaĵo: “For la plastajn glasojn!”,

… anoncas Italujo, sekve de la eŭropaj instrukcioj.

La Eŭropa komisiono inkluzivis la plastajn materialojn inter siaj prioritataj intervensektoroj, en propra Agadplano por cirkulanta ekonomio[1]. Jam en 2019 aperis leĝaro, antaŭvidanta la malpermeson de kelkaj plastobjektoj unuuzaj: kotonstangetoj, manĝilaro, teleroj, ŝalmoj, kirlbastonetoj por trinkaĵoj, sed ankaŭ tasoj kaj ujoj por nutraĵoj kaj trinkaĵoj faritaj el ekspansiita polistireno *[polistirolo]*. Finfine ankaŭ Italujo alproprigis al si tiun direktivon pri reduktado de plastaĵoj.

Unue gravas la eliminado de plastaj glasoj kaj tasoj, kiujn en Italujo oni konsumas inter 16 kaj 20 milionoj tage, al kio oni devas aldoni tre altan disperdiĝon en la medio.

Dua novaĵo rilatas al forigo de unuuzaj artikloj el kompoŝtebla plasto, laŭ la eŭropa normaro, kun pli kaj pli da procentaĵoj de kruda materio renovigebla, kiam ne eblas la utiligado de reuzeblaj alternativoj al unuuzaj plastaĵoj, destinitaj al rekta kontakto kun nutraĵoj.

Ĉi decido tamen ne estas kundividita de *Greenpeace Italia*, kiu siaflanke petas raporton al sendependa teknika konsilisto, inĝenjera fakulo pri ruboj kaj cirkulanta ekonomio, kiu difinas tion ĉi neadekvata pro la malsimpleco de la metiaj defioj starantaj antaŭ ni. Plie, li aldonas ke: *kontraŭstari la unuuzajn plastaĵojn, ilin anstataŭigante per monouzaj kompoŝteblaj plastaĵoj, ne forigas la problemon.*

Sed la teksto evidentigas, ke tiu lasta solvo devas esti uzata nur kiam ne ekzistas aliaj alternativoj. Jam multnombraj eŭropaj landoj estas laborantaj por malpliigi la produktadon de rubo, anstataŭigante la unuuzajn plastojn per reuzeblaĵoj.



Francujo, ekde la 1ª de januaro 2020, jam malpermesis la utiligon de manĝilaro “uzu kaj forĵetu” por tiuj kiuj manĝas surloke, ĉe surstrataj manĝejoj. Ekde la 1ª de januaro 2023, tiu malpermeso etendiĝos al ĉiuj unuuzaj aĵoj, ne nur al tiuj el plasto, kun la devigo utiligi reuzeblajn alternativojn. Apartaj rimedoj estas antaŭviditaj ankaŭ por la boteloj el PET[2] entenontaj likvajn nutraĵojn. De la 1ª de januaro 2023 la publikejoj devos sin provizi per almenaŭ unu fonto el trinkebla akvo kunligita al reto kaj alirebla por la publiko, kaj ĉiuj lokaloj, rajtigitaj al vendado de trinkaĵoj al konsumantoj, devos permesi al iu ajn mendi senpagan trinkeblan akvon (elkrana).

En Irlando estis pliampleksigata la nevendebleco de iuj objektoj, ne ankoraŭ leĝe normigitaj: el tiuj, la malseketaj viŝiloj, ĉiuj unuuzaj produktoj por sinlavado disponigitaj ĝenerale en hoteloj, gastejoj ks, ĉiuj plastaj suker- kaj kondiment-ujetoj, uzataj en kafejoj, restoracioj ks. Al Irlando aldoniĝas Germanujo kaj Nederlando, kiuj ne plu konsentas, ke oni senpage disdonu al klientoj aĵojn “uzu kaj forĵetu”, samtempe devigante la mastrojn meti je dispono, memserve, reutiligeblajn varojn.

Aŭstrujo intencas ree enkonduki la normon “redonota ujo”, nome deponigi kaŭcion por vitraĵoj; kaze de plastujoj estos pagenda imposto.

Kio en Italujo? Ĝi por la momento limiĝas lanĉi instigajn vortojn cele la stimuladon de ia eko-sinteno flanke de konsumantoj, tion ĉi ĝis oktobro ĉi-jara, kaj poste… *la estonteco estas sur la genuoj de Jupitero!*

il fatto alimentare

Adaptis kaj tradukis: ElDo
http://ilfatto alimentare.it

BIOKOMPONEBLAJ MATERIALOJ: ILIAJ KARAKTERIZAĴOJ



Notoj:


1. Cirkulanta ekonomio estas modelo de produktado kaj konsumado, kiu kuntrenas kundividadon, pruntedonadon, reuzadon, riparadon, rekuperadon de materialoj kaj produktoj ekzistantaj kiel eble plej longatempe. Tiel ĉi plilongiĝos ilia vivociklo, kun la eblo malpliigi minimume la malŝparon.
2. Polietilena tereftalato (PET) aŭ $(C_{10}H_8O_4)_n$ estas plasta polimero, kiun oni akiras per polimerigada proceso de tereftalata acido kaj mono-

→

Laste trovitaj!


Se ankoraŭ ne facilas vojaĝi, almenaŭ mi navigas, navigas tra la paĝoj interretaj serĉe de niaj eminentaj pioniroj, revivigataj de poŝtkartoj. Feliĉe tuthazarde mi albordiĝis ĉe la bela greka insulo Samos, en la Egea maro, patrujo de Pitagoro kaj tie konatiĝis kun Anakreon Stamatiadis.

Tre ĉarma bildkarto altiris mian atenton: tem-



as pri havena parto de Kostantinopolo, nuna Istanbulo, bele pentrita de nekonata aŭtoro. Ĉi tiu bildigas la internan parton de la Ora Korno, la larĝa, komuna elfluejo de riveroj Alibeyköy kaj Kağıthane. La sceno estas tre viva: per freŝaj, brilaj koloroj, per netaj peniktuŝoj la pentristo prezentas momenton trankvilan en tiu aktivega urbo.

Sed kio kaŝiĝas sur la malantaŭo?



Mallonga mesaĝo sendita de K/polo la 16an de novembro 1923 al esperantisto Vincente Orlando, Argentino: *Tutkorajn manpremojn Dro A. Stamatiadis, direktoro de "Bizantio"*.

1. etileno-glikolo. Ĝi estas plene reutiligebla. La fizikaj ecoj de PET kaj ĝia kapablo plenumi diversajn teknikajn specifaĵojn, pravigis ĝian elstaran evoluon en la fabrikado de tekstilaj fibroj, de diversaj ujoj, kaj ĉefe de boteloj, pletoj, metalaj bendoj kaj lamenoj. Aprobita estas ĝia uzo por ujoj kiuj estas en kontakto kun nutraĵoj. Por pliaj informoj, legu ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Polietilena_tereftalato

Jen ne tiom konata pioniro de la greka E-movado: Li naskiĝas en Florenco, en 1868, kaj mortas en 1964, en Ateno. Li diplomiĝas pri Filozofio en la Atena Universitato, poste pri Agrikulturo en Montpeliero kaj fine doktoriĝas pri Medicino en la Sorbona Universitato, Parizo. Jam en 1888 A. Stamatiadis ekscias pri Esperanto kaj baldaŭ li konvinkiĝas, ke nur per internacia lingvo, malhavanta kulturajn aŭ politikajn ligojn al naciaj idiomoj, oni helpus forigi la barojn starigitajn de diversecoj religiaj, moraj kaj naciaj, tiel nuligante la kaŭzojn de daŭraj konfliktoj.



Baldaŭ li bone regas la lingvon kaj ekde 1904 ekaktivadas, instrue kaj propagande, en Turkujo kaj Grekujo. En dec. 1906 li fondas en Samos la unuan Esperanto-societon*. Li iĝas ĉefdirektoro de la sanitaraj oficejoj krom esti la oficiala kuracisto en la insula prizono. Li ĝuas la amikan favoron de la princo Andreas Kopasis, tiom ke la reganto subskribas dekreton por deviga instruado de Esperanto en lernejoj (1910). Krom tio, la oficiala organo de la Samosa Societo *Greklingva Esperantisto* estas senpage presita en la regna presejo. La princo fariĝas honora prezidanto de la societo kaj la princino Heleno prezidas la Virinan Grupon Esperantistan. Bedaŭrinde en marto 1912 la princo estas mortigita kaj ĉiuj esperoj pri brila estonteco forfalas. La nova princo Grigorios Vegleris, interalie bofilo de la fama volapukisto Karateodori, nuligis tiun leĝon, eĉ postulante repagon de la mono elspezita por ĉiuj presadoj de la gazeto. Unu jaron poste A. Stamatiadis estas ekzilita en Istanbulo pro politikaj kaŭzoj, sed li ne senkuraĝiĝas, male, eĉ pli hardita, li rekomencas sian pro-esperantan laboron. En tiu urbo li fondas *Konstantinopolan E-Asocion*, oficialigitan de la enlanda Registaro, ekde 1921 redaktas ĝian periodaĵon *Bizantio* kaj organizadas sinsekvajn kursojn.




Reveninte al Ateno en 1924** kaj kuniginte la izolitajn grekajn esperantistojn, li sukcesas fondi la societon *Helena Esperanto-Asocio* kaj iom poste *Helenan Esperantistan Akademion*. Danke al siaj rilatoj kun diversaj institucioj, d.ro Stamatiadis akiras la jenan eksterordinaran rezulton: *"la Helena Respubliko, Ministerio de Kultoj kaj de Instruado, publikigas la dekreton, kiu favorigas la enkondukon de Esperanto en la Instruistaj Institutoj de Greklando - Ateno, 28.10.1926* (mencio, aperinta en *Esperanto Triumfonta,* nov. 1926). Li mem estas nomumita profesoro por la kursoj de la lingvo en la koncernaj institutoj en Ateno.

Jen kion skribas la ministro G. Didaĥos, duadekrete, al la direktoroj de la Instruista Instituto kaj de Unuklasaj Instruistaj Institutoj de elementa kaj mezgrada instruado:

Estas sendube al vi konata la disvastiĝo de la Helpa Lingvo Internacia Esperanto. Preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj jam enkondukis la instruadon de ĉi lingvo en siaj lernejoj, unuj kiel deviga, aliaj kiel nedeviga fako.


Opiniante, ke ĝia ellerno ankaŭ flanke de la novhelenoj estus tre utila al ili, ĉu por ilia propra kleriĝado, ĉu por ilia interrilato kun aliaj nacioj, ni aprobas, ke vi permesu la instruadon de la antaŭe citita lingvo al tiuj el la lernantoj, kiuj deziras sekvi kursojn de Esperanto.





Grandioza sukceso de tiu entreprenema greka pioniro! La *Nova Gramatika Libro*, esenca bazo por akirigo de la diplomo fare de estontaj E-instruistoj, estas de li verkita en 1928. Post 19 jaroj, d-ro Stamatiadis aperigas la 2[an] parton: *Gramatiko ekzercaro kaj epitomo de historio de la tutmonda helplingvo*, kune kun *esperanta-helena kaj helena-esperanta vortaretoj* (1947).

En 1931 aperas alia dekreto de la Ministerio pri Publika instruado, surbaze de la antaŭa, per kiu ĝi rekomendas al la Ĝenerala Inspektoro de la Publikaj Lernejoj en Ateno, rajtigi la Prezidanton de la Esperantista Akademio, A. Stamatiadis, instrui la internacian lingvon al lernantoj de Gimnazioj kaj Instruistaj Institutoj. En oktobro 1939, aperas cirkulero de la koncerna Instrua Ministerio per kiu estas konfirmite, ke Esperanto daŭre estos studobjekto en la *Normala Altlernejo de Mezgrada instruado kaj en eksperimentaj Lernejoj de la Universitatoj en Ateno kaj Tesaloniko.* Per ĝi la Subministro, N. Spentzas, aparte rekomendas plifaciligi la taskon al la Diplomitoj de la Esperantista Akademio en Helenujo, substrekante ke tiuj tute senpage akceptis instruadi la lingvon *(*el *Esperanto Triumfonta - febr. 1940).* Enkondukas ĉi informon kelkaj vortoj de d.ro Stamatiadis mem: *"Kuraĝon! Ni ne lasu nin influi de la nuntempaj malagrablaj cirkonstancoj"* [...] *"mi estas certa ke post la fino de la nuna milito, E. elmontriĝos vere grava faktoro, preta por cementi per forta solidareco la tiel kruele provitan homaron".*




Dum la tuta militperiodo li estas ĉe la *frontlinio*, laborante pluen, prizorgante senhalte la revuon *Helena Esperantisto,* organizante kursojn, ne nur en Ateno sed ankaŭ en ĉirkaŭaj urbetoj. Per siaj homamaj, esperodonaj, spronaj vortigoj li sukcesas ricevi la kunlaboron kaj subtenon de kelkaliaj grekaj esperantistoj.

Sed bedaŭrinde post la fino de la tutmonda katastrofo komenciĝas en lia lando same kruela, multjara interna milito: ties konsekvencoj estas, ke la greka E-movado, frukto de la elstaraj iniciatemo kaj engaĝiĝo de A. Stamatiadis, iom post iom velkas. Meze de la 1950[aj] jaroj ekaktiviĝas en Ateno kaj Tesaloniko grupeto da esperantistoj, dum, tie kaj tie tra la lando, aperas kaj unuopaj, izolitaj esperantistoj kaj malmultmembraj societoj, kiuj tamen komencas sian agadon propagandan kaj instruan.

Post tiuj jaroj malmultajn informojn eblas trovi pri tiu eminenta esperantisto. Sed oni scias, ke ĝis sia lasta vivojaro li okupiĝis pri esperanto, per verkado kaj kompilado de grandega 30-lingva vortaro. Lia filino Roksana Manusu transprenis, komence de la 1960[aj] jaroj la gvidadon de la Helena E-Asocio, revivigante ĝin.

Do, la semoj, disĵetitaj de tiu gravega, pionira esperantisto, trovis fine taŭgan grundon, por kreski, ekflori kaj fruktodoni.

Fontoj: eo.vikipedio; E-Muzeo Vieno; www.esperanto.gr.


★ Samos'a Esperantista Societo, fondita la 8ⁿᵉ de Decembro 1906.
Komitato : Hon. Prez. : Lia Moŝto la princo de Samos *Georgo Georgiadis*. — *L. L. Zamenhof*, *L. de Beaufront*. — Honoraj membroj : *Aleksandro Mavrojeni-Bey*, konsilanto de ŝtato; *Zouloumis*, konsulo de Grekujo; Dⁿᵉ *A. Stamatiadis*, Vickonsulo de Germanujo kaj Italujo; *Leon Missir*, konsula agento de Francujo; *Gregorio Louis Mark*, konsulo de Granda Britujo; *Oskar Missir*, vickonsulo de Aŭstrio-Hungarujo; *Fr. Mainetti* vickonsulo de Bel-

* Unue, sciindas, ke la insulo estis sub otomana regado de 1835, sed ĝi havis ian aŭtonomion kiel Princlando. En 1912, sekve de la rezultoj de la unua balkana milito, ĝi estis aneksita al Grekujo.

La fondojaro de la societo estas necerta, ĉar en iu ĵurnalo aperas la jaro '1905', en alia '1906'. Eble la plej fidinda informo venas de *La Ondo de Esperanto*, 1912, kiu pli detaligas la aferon: "post 4 monat-

Tiel mi kuiras... kaj vi?

Post longa foresto, revenas sursceneje receptoj proponitaj de legantoj kaj, kompreneble, ankaŭ de mi! Jam for estas nun la sufoka varmego somera kaj denove oni pli emas dediĉi sin al kuirado, tial mi reaktivigas ĉi tiun rubrikon per tipe triesta plado, normale preparita kiam la temperaturo estas iom pli freŝa. Jen kion mi proponas:

Buloj el pano

Ingrediencoj por kvar personoj

400-500	g. da malfreŝa pano, kies molaĵo estu densa sed mola
400	ml da malvarma lakto
150	g. da mortadelo aŭ fumaĵita ŝinko
1	ovo
iom	da haketita petroselo
2-3 pinĉetoj	da majorano
iom	da muskato
	salo kaj pipro, laŭbezone

Preparado

Dispecetigu la panon en grandeta blovo kaj kovru la panpecetojn per la lakto, aldonante ankoraŭ iom da se ŝajnas al vi maltroa. Lasu ke la pano bone trempiĝu. Premante per la mano, eligu kiel eble plej da lakto kaj poste dispremegu la panpecetojn.

Ĉion miksu permane dum kelkaj minutoj ĝis kiam la tuto iĝos homogena; aldonu salon, pipron, muskaton, petroselon kaj mortadelon (aŭ fumaĵitan ŝinkon), tranĉitan en etajn kubetojn. Fine aldonu la kirlitan ovon.

Ĉiam permane erigu la eventualajn pankrustajn pecetojn kaj se la pastaĵo estas tro malseka, aldonu iom da raspita pano, por la tuton densigi. Kiam la miksaĵo ne plu alĝuiĝas al la bovlo kaj viaj manoj, lasu ĝin ripozi dum duona horo. Gustumu ĝin, por kontroli ĉu ĝi estis ĝuste salita. Dum oni pretigas la miksaĵon, varmigu akvon en marmito: kiam ĝi ekbolas, aldonu pugneton da salo. Intertempe oni preparu la bulojn, kun diametro de ĉ. 6-7 cm, farunu ilin kaj per truita kulerego enmetu en la akvon de 5 ĝis 7 buloj (tio dependas de ilia grando kaj de tiu de la poto). Estas rekomendite, ke la akvo ne bolu, sed boletu.

Ekde kiam la buloj supriĝas kaj flosas sur la akva surfaco, lasu ilin kuiri ankoraŭ ĉ. unu minuto, post tio elakvigu ilin per la truita kulerego. Konsilindas provi, kiam la unua bulo estos malvarmeta, duonigi ĝin por kontroli, ĉu la interno estas finkuirita.

Daŭrigu tiel ĝis la tuta pastaĵo estos finita.

La plej perfektaj saŭcoj, kiuj bone harmonias kun la panbuloj, estas gulaŝo kaj viandraguo. Antaŭ ol manĝi, surŝutetu per raspita parma fromaĝo... kaj bonan apetiton!



El https://ridejo.ikso.net/pri





Vikipedio en Esperanto estis fondita la 6ª de novembro 2001 kiel 11ª lingvoversio de la interreta enciklopedio Vikipedio kaj nuntempe enhavas **303.983** artikolojn. Ĝia fondinto estas konsiderata la usona esperantisto Chuck Smith. Esperantistoj kontribuis ankaŭ al la fondiĝo de kelkaj pliaj lingvoversioj de Vikipedio (ĉeĥa, slovaka, oseta, svahila) kaj la enkonduko de subteno de la Esperanta alfabeto en januaro 2002 malfermis la vojon por la alfabetoj de ankaŭ aliaj lingvoj kaj plifruigis la transiron de la tuta Vikipedio al la normo Unikodo.



oj (ndr: de post dec. 1906) *la Societo laŭ ordono de la registaro estas fermita kaj la popolamaso intencis mortigi la pionirojn de Esperanto, kies prediko ŝajnis esti kontraŭreligia kaj kontraŭnacia. Post ses monatoj la Societo estis ree permesita (en oktobro 1907)...*

* * Aliloke oni informas, ke li transloĝiĝis al Ateno en 1926, starigis la Novhelenan Esperantistan Socieon kaj la Helenan Esperantistan Asocion, kun filioj en Tesaloniko. Laŭ la sama fonto, li estis en kontakto kun la plej gravaj institucioj de Grekujo, politikistoj, aktoroj ka.

Limerikoj

Magdaléna Feifičová, mallonge Fejfi, el Slovakio, kara amikino mia, prezentis al mi, por legado, kelkajn siajn *Limerikoj*-n kaj tuj mi akceptis ŝian proponon, ĉar mi ekpensis: "certe ĝi povas estu bona temo por la legantaro de TEA-Bulteno". Je ĉi punkto tamen mi devas malkaŝi al vi sekreton (*mi rekomendas, tute ne distrumpetadu pri ĝi tra Esperantujo!*): por mi tiu vorto estis envere iom mistera, ĉu estas io rilata al poezio?: eble!?!? Tial tuj mi ekserĉis la ĝustan signifon de *Limeriko*.

Unue, esploro en la itala vortaro kaj poste en interreto. Ĉiuj ttt-ejoj, de mi vizititaj, samopiniis, tial kun pura konscienco mi rakontas al vi, kio estas Limeriko!

Ĝi estas mallonga ŝerc-poeziaĵo, kvin-versa laŭ skemo AABBA (*Noto: la unuaj du kaj la lasta rimas inter si, samkiel la tria kaj la kvara*), havanta tre precizan strukturon kaj rigidan skribo-regularon. La unuaj limerikoj aperis en Anglujo, ĉ. en la jaro 1820, kaj la nomo devenas el la irlanda urbeto Luinmneach, anglalingve Limerick. La celo de tiu komponaĵo estas ridigi aŭ ridetigi per ties enhavo sprita, ofte maldeca, foje eĉ sensenca. En la klasika limeriko la unua verso priskribas la protagoniston kaj nepre mencias lian loĝlokon: nuntempe ĉi regulo ne plu estas observata.

Kaj nun ni legu kune ekzemplon pri limeriko de Raymond Schwartz, aperinta en *Kun siaspeca spico*:

Jen estis fraŭlin' en Parizo;
ŝi dormis sen noktoĉemizo,
feliĉe ŝi havis
- Kaj tio min ravis -
piĵamon en mia valizo.

Nuntempe brilaj limerikoj en Esperanto venas el la plumo de Mikaelo Bronŝtein.

Fejfi partoprenis dum la 5ª Somera Esperanto-Studado (SES), virtuale okazinta, en traduk-kurso estrita ĝuste de li, dum kiu la ĉeestintoj devis "elcerbumigi" limerikojn. Do, du poemojn de Fajfi, kiujn certe vi ŝatos.

Ne estos mia sorto limeriko.
Mi ne veturos eĉ al Ameriko.
Fejfi pri la ambaŭ fajfas.
Teneran mesaĝon ŝi febre tajpas,
hastas; atendas ŝin ĉelime Riko.

Irante ŝi ĉiam sekvis sian nazon,
ne esceptis iun kazon.
Sed ŝia nazo estis ne nur kurba,
sed ankaŭ kukurba.
Neniel ŝi povis meti ĝin en fremdan vazon.

Ĉu interesaj? Mi atendas viajn komentojn aŭ, eĉ pli bone, sendu viajn limerikojn al mia retadreso. Elda

Solvoj de **Cerbotikliloj** n. 1 kaj 2, aperintaj en TEA-Bulteno jul-aŭg 2021
1. La entrudiĝinta bildo estas tiu markita per litero: c)
2. La petita nombro estas: 1/720
Fakte, la vicon konsistigas sekvo de: x 1/2, x 1/3, x 1/4, ktp

2ª FOTO-KONKURSO 2021
KROATIO DE VIA OKULO

Ĉu vi vizitis Kroation?
Ĉu vi havas interesa(j)n foto(j)n?
Ĉu vi ŝatas kundividi ĝin (ilin) kaj eĉ gajni belan premion?
Se la respondoj estas JES, nepre partoprenu la Konkurson!
Vi povas sendi maksimume 5 fotojn kiujn vi faris IAM AJN en Kroatio!
Do, ankaŭ malnovaj fotoj bonvenas!
Por ĉiu foto bv. aldoni la lokon kaj daton (almenaŭ jaron, se vi ne memoras precize).
Nur gravas, ke la fotoj estu VIAJ!

HES KEU

La limdato:
15ª de septembro2021
Proklamo de la rezultoj:
meze de novembro 2021
Fotojn sendu al:
hes.keu@gmail.com

Oktobra Programo	
1a, vendredo	20h00 - Ordigo de la sidejo
5a, mardo	Ordigo de la sidejo: helpemuloj anonciĝu ĉe Elda
8a, vendredo	20h00 - Babilada vespero
12a, mardo	18h00 - Prezento de la unuagrada kurso okt '21-majo '22
15a, vendredo	20h00 - Bildprezento de Esperantaĵoj - **Niaj antaŭuloj**
19a, mardo	18h00 - Unuagrada kurso
22a, vendredo	20h00 - Bildprezento por la Virtuala Kongreso de IKUE: **Religio en bildoj**,
26a, mardo	18h00 - Unuagrada kurso
29a, vendredo	20h00 - Bildprezento: **Informado al la membroj**

Aforismo

Se ĉio sur la Tero estus racia, nenio okazus.
Fedor Michailovich Dostoevskij (1821-1881)

Bulteno de Triesta Esperanto-Asocio
Redaktanto: Elda Doerfler - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org